
# Turangia 38 Luko

2-a trimestro 2015

## En tiu numero vi legos..


| | |
|---|---|
| Dum sia partopreno en la staĝo de Pluezec. Jane faris tre interesan "noktan promenadon" . | p.1 ĝis p.4 |
| Erin, la novzelanda amikino de Gérard kaj Jeannine Layseman travivis teruran tertremon en 2011. Jen la unua parto de artikolo, kiun ŝi verkis por la revuo "**Esperanto sub la Suda Kruco**"; oficiala organo de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. | p.5 ĝis p.8 |


# Lumturoj




Dum Renkontiĝoj 2014 (16an – 23an de Aŭgusto) far Pluezek Esperanto (Plouezec), estis proponata « nokta promenado al lumturoj ».

Ĵaŭdon la 21an de Aŭgusto, kvardeko da partoprenantoj staras sur marbordo, kie du specialistoj pri lumturoj akceptas nin. Ni kviete paŝas laŭ indiana vico sur doganista vojo ; la suno progresive malaperas ĉe la horizonto.

Baldaŭ kelkaj lumoj ekaperas : dudeko…trideko. Niaj gvidistoj klarigas al ni, ke ĉiuj lumoj ne estas lumturoj ! sed akvaj signaloj indikantaj danĝerojn kiel sabla benko.

Ili estas fajroj au lumaj turetoj konstruitaj sur rokplenaj platajoj.

Poste, ni rimarkas, ke lumoj estas blankaj aŭ trikoloraj, kaj brilas intermite. La koloro indikas la metran videblecon, ekzemple 10 marinaj mejloj (18520 m) en homogena atmosfero.

La nombro de ekbriloj kaj la daŭro de malluma fazo (ekz po 2 ekbriloj dum 15 sekundoj) permesas identigi du situantajn en sama navigzono lumturojn, kiuj neniam havas samajn karakterizojn.

Lumturoj havas identigan karton : estas teknikaj donitaĵoj (informiloj) provizataj pere de ĉiu « subdivision des phares et balises » ( mallonge : S.P.B. ) Ekz :

> **HÈAUX DE BREHAT**
>
> -lumturo en maro
>
> -geografiaj koordinatoj 48°54'30"N – 3°05'15"W
>
> 
>
> -alto de la turo : 51,10 m (senkapigita per germanaj soldatoj en Aŭgusto 1944 suraltigita de unu etaĝo poste) - nun 57 m alta.
>
> -horizontala fokusa optiko
>
> -luminado per halogena lampo 180 W , fajro de 3 okultaĵoj : blanka, ruĝa kaj verda : 12 sekundoj
>
> -videbleco : 15 mejloj

SIGNALILOJ DE FRANCAJ METROPOLAJ MARBORDOJ

- 1746 lumturoj – fajroj sur tero kaj lumaj turetoj el kiuj 31 lumturoj en maro.
- 102 teraj lumturoj (sur kontinento aŭ sur loĝataj insuloj).
- 1293 teraj fajroj kaj lumaj turetoj
- 5 gardataj lumturoj en maro
- 3 buaj lumturoj
- 1938 balzoj
- 1090 buoj sen lumo
- 920 lumaj buoj
- 162 sonoraj avertiloj

- 36 radiobalzoj
- 658 pasivaj reflektiloj de radaro

KONSTRUADO DE LA LUMTURO « HÈAUX DE BREHAT »

Ĝi situas en maro – estis grava aventuro : la S.P.B. hezitis inter insulo ĉe Maro kaj la kontinento por doni sekurecon al golfo de St Malo.

Finfine, oni eligas rokojn (ŝtonegojn) situantajn en rifozono nomata « Epées de Treguier ». Estas porfira ebenaĵo komplete superakvita per alta tajdo. Krom kelkaj tre danĝeraj nadloj, la roko estas defendata per violentaj fluoj de 8,10 nodoj kaj ankaŭ per timigaj plaŭdrompaĵoj, kiam maro leviĝas.

Tamen rapida konstruado kondukiĝis kiel milita kampanjo kun trupo de 30/60 viroj havinta kiel generalon, la faman inĝenieron LEONCE REYNAUD (LR). La konstruado daŭris de 1836 ĝis 1839.

Kvar kampanjoj sufiĉis por tiu grava faro, kiu kunigis : teknikon, sciencon, homecon.

LR starigis sian bazan kampon kiel komandejon sur insulo Brehat je dekono da km.

En tiu loko, 2 nadloj konstante elmergiĝis.

LR interligis ilin per speco de mallonga digo. Poste li konstruigis platformon 4 m super la plej altaj tajdoj. Ili konstruis ŝirmejon por laboristoj. LR antaŭkalkulis ke trideko da laboristoj loĝos tie sed okazis ke 60 laboristoj loĝis tie.

En la dormejo 27 m² kun supermetitaj hamakoj ĉiu homo ĝuis spacon 2m x 0,65m.

- alia ĉambro servis kiel manĝejo tage kaj dormejo nokte.

LR kiel, bona generalo, ne malzorgis siajn 60 homojn «batalemulojn» : nutraĵo, kontrolo por eviti skorbuton, ĉiutaga aerumado de la hamakoj, ĉiusemajna banado. La sanstato dum la kvar kampanjoj de konstruado estis rimarkinda.

- ĉiutage, la laboristoj manĝis aŭ laboris sekvante la horan tajdon. Sonorilo donis signalon por haltigi laboron kaj rapide eniri loĝejon.

Tamen iufoje la maro ne normale altiĝis. Tial, malfruuloj devis sin ĵeti en akvon antaŭ ol la profundeco danĝeriĝos.

Tio estis la sola amuzo dum la tago !

En la tempo de LR, ne eksistis leĝoj pri labora sekureco.

TIAM KOMENCIĜAS LA OFENSIVO !

Materialoj estis elŝipigitaj laŭ bezono :

- Granito : tajlita sur insuleto « île Grande » situanta je kelkaj mejloj de Brehat.
- Kalko devenis de Luara Baseno.
- Ligno estis transportita el Saint Malo.
- Proviantoj kaj akvo venis el kontinento.

Ĉio elŝipigitis sur Brehat.

Poste sur Brehat en atelieroj : ŝtontajlistoj, ĉarpentistoj prilaboris materialojn, kiuj, post registrado kaj numerado estis senditaj sur la rokoj, per navetŝipoj, iufoje luitaj de fiŝkaptistoj.

Krom kelkaj malgrandaj ordinaraj incidentoj, turnventego en 1836 forblovis ĉiujn hieraŭajn preparojn pri la instalo de la unua ŝtono, dronigis kelkajn ŝipetojn kaj vundis malgrave moderan nombron da laboristoj. La tura starigo disvolviĝis sen problemo kaj ĉefe sen mortinto...

Oni ne memoras la laboristojn, kiuj gajnis tage 3 frankojn, el kiuj oni deprenis la prezon de ilia manĝaĵo.

Oni memoras la inĝenieron, kiu gajnis gloron kaj katedron en politeknika lernejo.

Sed, ne gravas ! en 1839 la lumturo estis instalita, tial ĉiuj ŝipanoj gajnis pli da sekureco.

Tîu lumturo 51,10 m alta, konstruita spite seriozaj malfacilaĵoj estis modela sukceso.

« Ĝi havas la simplecon de unu mara planto » skribis MICHELET.

ĈIUJ LUMTUROJ ESTAS MIRINDAĴOJ DE INTELIGENTECO DE TEKNIKO KAJ BELA ARKITEKTURO.

EKZ :



Eckmühl (1892) situanta sur pinto de Penmarch « Golfeto Audierne ». Ĝi havas murojn el granito de Kersanton, duregajn, netriviŝtajn, ĝia tegmentita ŝakto de ŝtuparo estas kovrita per opala vitro.



La Coubre (1905/1907) en la nordo de estuaro de Ĝirondo. Tiu lumturo enhavas 2 loĝejojn por gardistoj, ĉambron por laboristoj, maŝinejon, radiogvidilon (goniometro) kaj GPS stacion (330 mejloj = 611 km)

HISTORIO PRI LUMTUROJ

A - ANTIKVECO – origino de lumturoj konfuziĝas kun la navigado.
Unue estis fajroj bone situantaj. Turoj kaj fajroj rapide malaperis.

Historiistaj rakontoj indikas ke Grekio komencis marbordajn signalojn : de konstantaj fajroj, al lumturoj, kiel la lumturo de Aleksandrio, klasigita inter la sep mirindaĵoj de la mondo. Konstruita ĉirkaŭ 3 jarcentojn antaŭ Kristo, la konstruado daŭris dudekdu jarojn. Arabaj vojaĝantoj priskribis ĝin. Per la brulaĵo de ligno, ardaj braĝoj kaj fumoj el la ardejo estis videblaj nokte kaj tage de 15 aŭ 20 km. Post 16 jarcentoj, ĉirkaŭ 1350, tertremo detruis ĝin.
Nun, estas loko por arkeologaj serĉadoj.

Dum antikveco, komerco disvolviĝis tra Mediteraneo. Grekoj, Romianoj, balzigis ankaŭ marajn vojojn. Lumturoj estis tridekkvin aŭ tridekses en Gaŭlo.

Jen, «la Tour d'Ordre de Boulogne» tre grava lumturo en historio. Tiu lumturo el brikoj kaj ŝtonoj : 30 m alta super la marnivelo, borde de klifo. Poste pro malzorgo ĝi disfalis.
Ni ŝuldas ĝian konstruadon al Caligula. Tiu freneza imperiestro pensis venki oceanon dum milita aventuro per konkero de Granda Bretonio, ĉar la oceano retiriĝis.

Malgraŭ sortoŝanĝiĝoj daŭre brilis la XVII-a jarcento.

B - JARCENTOJ DE DEKADENCO

De la Romiana imperio (V-a jarcento) ĝis XIIa, XIIIa, XIVa ...

C - LUMTUROJ DE LA « SUN REĜO» (ROI SOLEIL)

Colbert [kolber] komencas revivigi lumturojn. Tio daŭras ĝis Konsuleco (1799-1804). Oni balzadis danĝerajn pasejojn kiel Chassiron (OLÈRON), phare des Baleines (RĖ), Cap Fréhel.

D – La ORA AĜO - 19 a jarcento

En 1800 : 24 lumturoj
1853 : 169
1883 : 361

LA LUMFOKUSA LUMTURO AŬ LA « FAJROJ »

Unue, supraj turaj fajroj estis ekbriligataj per ligno aŭ karbo, poste kun krudaj meĉoj de rezino aŭ kotonaj meĉoj trempitaj de oleo aŭ sebo. Dank'al industria revolucio kaj rapidaj, maraj komercaj progresoj (koloniado), teknika matureco (bontenado, plibonigado, lumigado), lumigadaj progresoj sekvas tiujn de komerco kaj marnavigado.



-inventaĵoj pri lampoj kaj parabolaj reflektiloj kreskigas lam-

pajn povojn.

-En 1821, AUGUSTIN FRESNEL imagis lumturojn kun lensa aparato – tiu unua aparato estis instalita supre de la turo de Cordouan [korduan} ĉe estuaro de Ĝirondo. En 1823, la lumtura atingopovo mezuris 16000 klaftoj [toises] (ĉirkaŭ 31,2km) ; oni povis vidi ĝin de 17 leŭgoj [lieues] per lornoj dum taglumo kaj nudokule nokte.

En la tuta mondo, lumturoj estis ekipitaj rapide : Anglio en 1823, Hispanio 1824, Belgio 1836, Italio 1837, Svedio 1840, Usono 1841, Prusujo 1845, Aŭstralio 1849, Brazilo 1850, Portugalio1855, Kreto 1856.

TIUJ SISTEMOJ NECESIGAS KONTROLON DE LUMTURAJ GARDISTOJ*

Kiam estas lumturo estas ankaŭ lumtura gardisto. Tiu metio konsistas en prigardo de maran navigadon el lumturo kaj plenumo de ĝian bonan funkciadon.

En Francio, gardistoj nomas lumturojn de alta maro : « inferojn », lumturoj sur insulo : « purgatoriojn », kaj tiuj instalataj sur marbordo « paradizojn ». En tempesto, « infero » estas la elektita predo de la elementoj. Male al la ŝipoj, kiuj evitas la batojn, lumturo devas elteni ilin sengrumble. Ĝenerale gardisto komencas sian karieron en « infero » kaj finas ĝin en « paradizo ».

La vivo estas malfacila por tiuj maristoj sen movaj, sidantaj alte super la maro, zorgantaj pri la bona funkciado de lampoj, kies lumoj balaas la oceanon de noktiĝo al tagiĝo. En tiu malgranda spaco la du gardistoj preterrenkontas unu la alian : unu vaĉas la alia ripozas. Dum tempestoj, kiam la ondoj atakas la turon, la deĵorŝanĝo ne povas okazi sed kion ajn estos la kondiĉoj, la gardistoj devas deĵori esperante ke la provizoj kaj la akvo daŭros ĝis la alveno de sekvantoj.

Ŝanĝo okazas per kablo de la "cartahu" [kartaŭ] (ŝnurego) ĵetita de la gardistoj al la deĵorŝanĝa ŝipo kaj, kiam fiksita, ĝi permesas la instaladon de iro kaj reveno, la gardisto « alvenanta », ekipita de sekureca zono rajdas dikan balonon pendantan dum la iro kaj reveno. Li estas tiam hisita per vinĉo manovrita per la du gardistoj ĉeestantaj en la lumturo. Sama operacio por foriranta gardisto, la provianto kaj la materialo. Tiu operacio okazas nur per vetero relative kvieta.

* teksto de Jeanne de Plouezec

Per kvieta vetero for de la bruo kaj de la furiozo, la vido de la lumtura gardisto havas ankaŭ ĝiajn bonajn flankojn. Malgraŭ siaj taskoj kaj sia malgranda teritorio, la gardisto ĝuas ian liberecon. Inter tiuj distraĵoj, oni povas citi la fiŝkaptadon : mar-araneoj, omaroj venas agrabligi la ĉiutagajn menuojn. Kelkaj sin dediĉas al pentrarton kiel François Jouas-Poutrel, kiu post la Triagoz, les Héaux de Bréhat, le Grand Lejon, pasigis 21 jarojn en lumturo de Roches Douvres. Aliaj ankoraŭ fabrikas fiŝfakojn, plektas korbojn aŭ sidilojn de seĝoj. Ŝipaj maketoj en boteloj aŭ lignaj ludoj havas ankaŭ siajn adeptojn. Komence de la jaroj 1950, plejparte la aŭtomateco finis la malagrablan vivon de la gardistoj. La krudaj vivkondiĉoj ne plu estas devigaj, kiam la teknika progreso permesas helpi ĝin. La lasta gardisto ĉesigis sian deĵoron en 2012.

Komence de la dua mondmilito, ĉiuj fajroj de la departamentaj lumturoj estis estingitaj laŭ la ordonoj de la Germanoj. Parola akordo certigis la ne difekton de la lumturoj kaj la ĉeesto de la gardistoj sub la kontrolo de la okupantoj. En 1942, la Germanoj postulas vakigilon de la gardistoj kaj en aŭgusto 1944, per dinamito, ili difektigis la lumturojn de Bretonio.

Komence de la jaro 1950, plejparte estis rekonstruitaj. Pro tio, la nunaj lumturoj malsimilas al la unuaj lumturoj.


De kelkaj jaroj, novaj helpiloj modifiis la kutimoj de la navigantoj. La tuta lumsistemo estis aŭtomatigita. La grandaj lumturoj de nia marbordo ne ŝajnas tiel utilaj kiel antaŭe. Tiuj konstruaĵoj havas gravan lokon en nia mara heredaĵo. Ili fariĝis emblemoj de nia rilato al la maro.

*Verkita de Jane Pinon helpita de Bérengère Turbillon, Danielle Margot kaj Madeleine Foucher.*

# TERURAJ TERTREMOJ EN CHRISTCHURCH

de Erin McGifford




**Enkonduko**

Christchurch estas la plej granda urbego en la Suda Insulo de Nov-Zelando. Ĝi havas 342 000 enloĝantojn.

Dum 2010 - 2014 Christchurch spertis serion de tertremoj - entute 15 000.

La plej gravaj estis je 4 Sep 2010 (7,1 je la skalo de Richter) kaj 22 Feb 2011 (Richter 6,3).





La tertremo de septembro 2010 rompis multajn konstruaĵojn kaj instalaĵojn, ekzemple vojojn, pontojn kaj la elektran kaj kloakan sistemojn.

Tamen, tiu tertremo okazis en la mezo de la nokto. Ni estis sekuraj en niaj litoj kaj preskaŭ neniu vundiĝis.





Anglikana katedralo antaŭ kaj post la tertremoj

La tertremo de februaro 2011 estis pli proksime al la centro de la urbego, kaj okazis en la mezo de la tago kiam multaj estis en la centro de la urbego. Mortis 181 homoj.

En diversaj partoj de Christchurch oni spertis la tertremon tre malsame. Ekzemple, en la nord-okcidenta parto de la urbego la plejmulto sentis iom da skuado kaj tio estis ĉio. En la orienta parto de la urbego multaj suferis multon. Muroj kaj eĉ tutaj domoj forfalis. La stratoj estis inunditaj per akvo kaj sablo. Grandaj fendoj tranĉis la vojojn. En aliaj lokoj oni spertis miksaĵon da problemoj.

Mia propra domo estis en mezgrada situacio. La kaŭzo estas la stabileco de la grundo. Sub la urbego estas miksaĵo de sablo, ŝtonoj kaj akvo. Kie estas pli da ŝtonoj la grundo estas pli firma kaj rezistema al la skuado de la tertremoj.

## Maria kaj la katedralo

La Katedralo de la Benita Sakramento suferis multe dum la tertremoj. Interalie, la kupoloj super la du antaŭaj turoj kolapsis kaj falis al la grundo.

Alte en la norda turo staris statuo de la Virgulino Maria. Restante nedamaĝita, ĝi turnis 180 gradoj dum la februara 2011a tertremo. Antaŭe ĝi frontis en la ĉambron, sed poste ĝi alfrontis la rompitan urbegon. Ĝi fariĝis simbolo de travivo el la tertremoj.











La statuo de Maria alfrontas rompitan urbegon

La norda turo kaj Maria

## Tago de la granda tertremo



Mia strato. Mia domo estas je la dekstra flanko.

La 22a februaro 2011 estis suna somera tago en Christchurch. Ses monatoj antaŭe ni spertis grandan tertremon, kaj ni alkutimiĝas al vivo en rompita urbego. Riparoj progresas. Tertremoj ankoraŭ okazas, sed tio estas normala afero post granda tertremo.



Mi ekster mia domo.
Mi grimpis el la fenestro videbla malantaŭ mi.
Notu la manko de muro je la najbara domo.



Mia domo

Mi ripozas en mia brakseĝo en la sidĉambro post mia lunĉo. Subite granda tertremo erupetas - abrupta skuo, kaj poste energia ŝancelado. Post ĉiu skuo, pli da objektoj falas, kaj pli da eroj saltas de sur la mebloj.

La radio-programo abrupte ĉesas.

Malglataj sonoj tumultas - klakado, molaj bruoj kiam grandaj objektoj atingas la plankon. La skuoj iĝas pli kaj pli fortaj, kaj mi timetas. Ŝajnas kvazaŭ monstra besto provas forŝiri, dispecigi la domon. Mi flaras polvon. Tio timetigas min : ĉu la trabo de la tegmento nun disiĝas?

La skuado tiom perfortas ke mi decidas ne eliri de mia seĝo, kvankam mi estas nervoza pro la granda fenestro tuj malantaŭ mi, kaj la tegmenta fenestro super mi. Sed la muroj kaj plafono nur mallaŭte knaras. Ŝajnas ke la domo flekse ŝanceliĝas harmonie kun la tertremo.

La tertremo ĉesas, post proksimume dek ok

sekundoj, sed la domo daŭre ŝanceliĝas dum kelkaj sekundoj - sekundoj kiuj ŝajne daŭras multe pli longan tempon. Mi ekstaras kaj iras al la kuireja pordo. Survoje mi devas grimpi super objektoj kiuj falis sur la planko. Ho ! Mi ne povas malfermi la pordon. La tertremo forte fermigis kaj ŝtopis ĝin. La aliaj du pordoj por eliri la ĉambron malfermas nur iomete - objektoj falis malantaŭ ili.

Mi deziras eliri de la domo - mi ne volas esti kaptita en ĝi. Kio okazos se la domo kolapsos, aŭ fajro komencos, aŭ pli granda tertremo venos? Mi deziras eniri mian kuirejon - mia martelo kaj aliaj iloj estas tie. Kun ili mi povos devigi la pordon malfermi. Mi deziras vidi tion kio okazas ekster la domo.



Kuirejo (tra la fenestro en la pordo)

Mi vidas tra la fenestro en la kuireja pordo ke la pordo de la fridujo malfermiĝis.


La elektra povo ĉesis kiam la tertremo okazis, kaj la grava malvarmeco kiu restas nun eskapas.

Mi aŭdas fluantan akvon en la banĉambro. Tio tre ĝenas min. Ĉu tubo rompiĝis - aŭ la necesejo? Ĉu la akvo inundos la domon? Post duon-minuto ĝi haltas, sed post plua tertremo dek-kvin minutoj poste ĝi rekomencas - sed baldaŭ haltas denove.

Mi movas kelkajn el la objektoj kiuj falis en la sidĉambro por ke mi povos atingi malfermeblan fenestron. Mi grimpas malgrandan ŝtuparon kaj eliras fenestron.

La piedvojo inter la strato kaj la domo aspektas kiel rivereto - akvo kaj fajna griza sablo fluas laŭ ĝi. Mi paŝas sur la gazono por atingi la vojon sen droni miajn ŝuojn.


Mi aŭdas najbarojn proksime; tial, mi grimpas super mia ĉe-strata barilo. La strato estas kiel labirinto - mi zorge paŝas inter lagetoj, malseka sablo, fendetoj, kaj leviĝitaj kaj malleviĝitaj pecoj de la piedvojo - por kunveni kun miaj najbaroj.



La piedvojo ekster mia terpeco - kovrita de sablo, akvo, ktp.

Ili estas bonhumoraj. Ili diras ke la tetremo havis grandecon de 6,3 laŭ la skalo de Richter, kaj ke la epicentro estis ĉe dek kilometroj sude de Christchurch.

Mia najbaro, Sean, havas sangon sur la vizaĝo. "Briko falis sur min" li diras. "La briko rompiĝis - sed mi estas bonstata." La brika muro kiu ŝirmas kontraŭ fajro falis de lia domo. Nun, duono de liaj ĉambroj estas malkaŝitaj al preterpasantoj.



La brika muro forfalis de la domo de mia najbaro Sean.

Alia najbaro, Christine, diras "Mi ĉiam scivolis kiel aspektis la interno de via domo - kaj nun mi scias". Ili ambaŭ ridegas. Poste, Anita, la edzino de Sean, diras al mi ke ŝi estis for kiam la tertremo okazis. Kutime je tiu horo ŝi dormetas sur la sofo apud tiu muro kiu nun kolapsis. Do, pro bonŝanco ŝi eskapis vundigon aŭ eĉ mortigon.

Mi revenas al mia hejmo. Mi trovas kelkajn longajn pecojn de ligno malantaŭ la aŭtomobilejo kaj metas ilin laŭ la piedvojo por povi piediri sur ili sen malsekigi miajn ŝuojn.

Mi provas malfermi la eksteran kuirejan pordon sed malsukcesas. Mi iras por kontroli la malantaŭan gazonon. Domaĝe! La brika kon-

traŭ-fajro-muro de la najbara domo kolapsis. Inter niaj du domoj estas mallarĝa spaco de nur proksimume 60 cm. Nun ĉi tiu spaco pleniĝis kun brikoj, ligno, kaj pezaj pecoj de betono ĝis la alteco de proksimume 1,5 metroj.



La brika muro sur la domo de mia najbaro Brett - antaŭ la tertremo



La brika muro forfalis de la domo de mia najbaro sur mian tegmenton, gazonon kaj fenestrojn.

Brikoj ankaŭ falis sur mian tegmenton apud mia tegmenta fenestro. Du brikoj eĉ falis sur la fenestron - bonŝance la vitro estas fortigita kaj ne rompiĝis. Aliaj brikoj falis sur mian gazonon kaj ĝardenon. Mi malkovros poste ke granda peco de betono rompis mian kloako-tubon. Brikoj eĉ rompis la grandan fenestron de la sidĉambro, kaj la fenestron de la banĉambro.

Jen surprizo por mi : dum la tertremo mi sidis en la sidĉambro je la alia flanko de tiu fenestro, sed mi ne aŭdis la brikojn kiuj falis sur la tegmenton, aŭ la rompon de la fenestroj. Ŝajne, la vido de falantaj objektoj kaptis mian atenton. La tertremo daŭris tre mallonge kaj mi ne havis tempon por distingi inter la diversaj sonoj. Ankaŭ mi sentis nur la skuadon de flanko al flanko kaj ne la supren-kaj-suben skuadon.

Poste mi aŭdis ke la grundo rapide leviĝis kaj falis pli ol unu metron. La konstruaĵoj sur tiu grundo ankaŭ leviĝis, kaj poste falis - kaj koliziis kun la grundo kiu denove leviĝis. Do, duobla bato frapis la konstruaĵojn.

Kelkaj homoj kiuj promenis sur la strato dum la tertremo estis ĵetitaj al la tero pro la forta skuado.

Mi movas brikojn por alproksimiĝi al la banĉambra fenestro.

Mi grimpas en la fenestron, kaj elprenas martelon kaj aliajn ilojn de la kuirejo.

Mi uzas ilin por devigi ke la malantaŭa pordo de la domo malfermu. Tamen, nun ĝi ne refermas. La tuta pordo malleviĝis, kaj la lango de la seruro ne plu iras en sian truon.

Mi memoras ke tuj post la tertremo mi aŭdis fluantan akvon. Do, kie ĝi estas?

Sur la planko en la banĉambro tute ne estas akvo. Estas multaj aliaj objektoj kiuj falis el bretoj, sed ne akvo. Mistero! Poste mi trovis la akvon - sub la domo. Akvo kaj sablo spruĉis el la grundo tie, kaj faris lageton.

Mi rigardas la ŝtopitan pordon inter la kuirejo kaj la sidĉambro. Hmm - ŝajnas ke la problemo estas sur la alia flanko. Por la tria fojo hodiaŭ mi grimpas tra fenestro - ĉifoje la sidĉambra fenestro. Mi martelas la pordon kaj fine malfermas ĝin. Bedaŭrinde ĝi ne plu volas fermi. Fakte, estas utile ke la falantaj brikoj rompis du fenestrojn, ĉar per ili mi povis eniri mian domon spite la ŝtopitajn pordojn.

*Vi legos la daŭrigon*
*sur la venonta Turanĝia Luko....*

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se tio estas necesa.

**Centre Culturel Esperanto Touraine**
**Halles de Tours**
**Place G. Paillhou**
**37000 TOURS**
**Tel : 02 47 44 62 12**
**esperanto-touraine37@wanadoo.fr**
**http://esperanto-tours.1s.fr**